

DERIVAJ VERBOJ DE LA AINA LINGVO¹⁾

KIRIKAE Hideo (bedaŭrata ainologo)

¶ 1. Atoma konstruo kaj molekula konstruo de vortoj

En unu versaĵo el Ainaj Kantoj de Dioj,²⁾ en kiu kolektigis 13 ainaj tradiciaj rakontversaĵoj, oni trovas strangan viron, kiu nomiĝas pon-rupne-kur. La nomo mem estas stranga. La verkintino CIRI Yukie (1903–1922), ainino, tradukis ĝin simple per la japana lingvo kiel "vireto". Tamen la origina senco de la nomo estis eble tiel memkontraŭdira kiel "malgranda-granda-viro" aŭ "juna-maljuna-viro". Lia faro estas same kun la nomo memkontraŭdira.

Li enbatis palisojn en riveron por fari akvobarilon kaj fiksi korbon sur la riverkuŝejo. Tiel Ainoj kaptis fiŝojn. Tamen, kia surprizo, liaj palisoj estis faritaj el branĉoj de juglandujo. Ŝelo de la arbo kaj mola kaj nemanĝebla karno kovranta juglandan ŝelon estas materialo de nigra tinkturo. La rivero malklariĝis pro la palisoj, kaj monten naĝintaj fiŝoj revenis al la maro abomenante la malpuran akvon. Pon Okikirmuj, la heroo de la versaĵo koleris pro tio kaj batmortigis lin. Skuinte unu el la palisoj poste, li trovis, ke ĝi "ŝajnas etendiĝi trans la ses inferojn" (p.106)³⁾:

urajni ... iŭan poknasir imakakehe ĉiousi humi as.

palis(o) ses infer(oj) trans(on)-de ating(i) ŝajnas

"La paliso ŝajnas atingi la transon de la ses inferoj."

La frazo aludas ian kaŝitan karakteron kaj la devenon de la vireto".

Mi jam ĉesu babili kaj nun transiru al ĉefa temo. Kvankam esperanta "ating-" kaj aina ĉiousi estas ambaŭ verboj, ili diferencas inter si per kelkaj punktoj. Unu el la diferencoj estas tio, ke se la esperanta "ating-" estas rigardata kiel atomo el la vidpunkto de vortkonstruo, la aina ĉiousi estas molekulo. Oni ne povas disigi la formon de "ating-" en senchavantajn erojn. Tial ĝi nomiĝas "radiko". Dume, ĉiousi disiĝas en kvar partojn – ĉi, o, us, kaj i, kiuj havas plenan ŝencon propran.

En tiu ĉi traktaĵo, mi klarigu, kiaj atomoj kuniĝas, kaj kiel ili kuniĝas kaj fariĝas la molekula konstruo ĉi-o-us-i. Por la klarigo estas necese antaŭe, ke mi kondukas la leganton al la ĝenerala ekspliko pri ainaj verboj.

¶ 2. Du grupoj de verba radiko

Inter la verboj de la aina lingvo estas du specoj: simpla verbo kaj malsimpla verbo. Simpla verbo konsistas el sola verba radiko. Malsimpla verbo konsistas el verba radiko kaj afiksoj (derivado). Iufoje ĝi enhavas memstaran formon krom verba radiko kiel konsistparton (kunmetado). Ĉiu verba radiko povas stari kiel simpla verbo memstare. Laŭ mia difino, tio, kio perdos verban funkcion, se partigita, estas verba radiko. Verbaj radikoj mem estas dividitaj en du grupojn, unu
- la grupo de netransitivaj radikoj: ekz.,

kira "x₁-o forkuras" (p. 68);

la alia - la grupo de transitivaj radikoj: ekz.,

nospa "x₂-o x₃-on (=forkuranton) pelas" (P. 78).

Ĉiu verba radiko apartenas al unu el ambaŭ grupoj, kaj ne okazas tia afero, ke iu verba radiko funkcias foje netransitive, foje transitive. Pri tio estas neniu escepto. Tiel nekonfuza divido inter netransitiva kaj transitiva estas distinga trajto de la aina lingvo.

Ni povas supozi la ekziston de iu abstrakta senco, kiun ĉiu verba radiko enhavas komune. Ni nomu ĝin ago. Laŭ la divido de verbal radikoj ni distingas subspecojn de la ago. Ni nomu la komunan sencon de ĉiuj netransitivaj radikoj netransitiva ago, kaj la komunan sencon de ĉiuj transitivaj radikoj transitiva ago.

Ni nomu ulojn aŭ aĵojn, kiuj faras agon aŭ ricevas ĝin, ĝiaj koncernantoj. Sola koncernanto de netransitiva ago estas netransitiva aganto. al kiu respondas x₁. de kira "x₁-o forkuras". La nombro de koncernantoj de transitiva ago estas du - transitiva agento kaj ago-ricevanto. al kiuj respondas x₂ kaj x₃ de nospa "x₂-o x₃-on pelas". La verba radiko de ĉi-o-us-i "ating-" estas us, kiu, estante transitiva, signifas "x₂-o al x₃-o algluifias". Jen la ekzemplo de us por simpla verbo.

jupi ne kur oŭse kem-i sir us
pliaĝafrat(o) sola sang(o)-de ter(o) algluig-as-al

"Nur la sango de la pliaĝafrato algluigas al la tersurfaco." (La tersurfaco estas makulita per la sango de la pliaĝafrato, kaj lia korpo forestas.) (p. 66)

Se reprezenti pli simple

kem sir us
sang(o) ter(o) x₂-o al x₃-o algluiĝas
"Sango al tero algluiĝas".

En ĉi tiu frazo, la transitiva aganto estas kem "sang-" (x₂), kaj la agoricevanto estas sir "ter-" (x₃).

Kredeble, la leganto jam rimarkis, ke en la aina lingvo estas nek deklinacio nek kazo-markoj por montri koncernantan rolon de substantivo.

¶ 3. Diversaj koncernantoj (1) – iganto

Por kompreni la funkcion de simpla verbo, estas sufiĉe rekoni la supre ditajn tri koncernantojn. Se ni turnas nian vidon al malsimplaj verboj, ni rimarkos alispecajn koncernantojn. Unue ni observu igajn verbojn derivitajn pere de iga sufikso La verbo

oman-te "x₄-o x₁-on irigas" (p. 18)
= "x₄-o x₁-on sendas"

estas farita el la netransitiva radiko

oman "x₁-o iras"

kaj el la iga sufikso -te. Ni ekkonas, ke la du x₁, de oman kaj oman-te havas saman funkcion; ili ambaŭ estas la agantoj de la sama netransitiva ago. x₄ estas por ni nova koncernanto, kiu aliĝas kiel iganto al la netransitiva ago.

En la verbo

an-te "x₄-o x₁-on metas" (p. 18),

la iga sufikso -te algluiĝas al la netransitiva radiko

an "x₁-o ekzistas".

Kvankam ni povas esperantigi ĉi tiun derivan verbon kiel "meti", kvazaŭ ĝi estus transitiva, ni ne devas konsideri la sencon de la verbo paralele kun tiu de la transitiva verbo nospa "x₂-o x₃-on pelas". an-te ja montras netransitivan agon; ĝi tenas la netransitivan radikan sencon. Sekve unu el ĝiaj du koncernantoj, x₁, estas netransitiva aganto, kaj la alia, x₄, estas iganto. Iga sufikso do havas funkcion rilatigi iganton al ago montrata de verba radiko.

Ni povas konsideri same en la okazo, ke transitiva radiko prenas igan sufikson. Ekz.,

kus-te "x₄-o igas x₂-on transiri x₃-on" (p. 12).

Ĉi tiu deriva verbo montras transitivan agon pro tio, ke ĝi enhavas la transitivan radikon

kus "x₂-o x₃-on transiras".

La koncernantoj de la deriva verbo estas transitiva aganto (x₂), agoricevanto (x₃) kaj iganto (x₄).

Kiel ni vidos post ne longe, la iga sufikso prenas diversajn formojn; krom -te troviĝos en ĉi tiu traktaĵo -e, -i, -ka, kaj -re. Kiun formon prenas la iga sufikso, tio estas decidita de la verba radiko mem, al kiu ĝi algluiĝas.

¶ 4. Diversaj koncernantoj (2) – aldonito

La verboj

o-rep "x₁-o frapante x₅-on taktas" (p. 96)

kaj

o-terke "x₁-o x₅-on surpaŝas" (p. 90)

estas faritaj el la aldona prefikso o- kaj la netransitivaj radikoj

rep "x₁-o taktas"

kaj

terke "x₁-o saltas".

Ĉar ĉi tiuj derivaj verboj enhavas netransitivan radikon kiel kernon, ili tenas netransitivan sencon kaj postulas netransitivan aganton. Dank' al la algluiĝo de la prefikso, ili postulas plu alian koncernanton ol la pridiritajn antaŭe.

Estas entute tri aldonaj prefiksoj: krom o- troviĝas e- kaj ko-, uzataj jene.

e-homatu "x₁-o pro x₅-o miras" (p. 42)

derivita de

homatu "x₁-o miras";

ko-hosipi "x₁-o al x₅-o revenas" (p. 44)

derivita de

hosipi "x₁-o revenas".

La tri aldonaj prefiksoj respondas ĉiu al iu propra koncernanto, tamen mi nun traktu la ĉiujn koncernantojn kune, kaj nomu ilin aldonito. Aldonaj prefiksoj do servas enkonduki aldoniton kaj rilatigi ĝin al radika ago.

Ĉi tiu nova koncernanto aliĝas ankaŭ al transitiva ago, se la prefiksoj algluiĝas al transitiva radiko. Tiel fariĝas la deriva verbo, kiu montras transitivan agon kaj postulas tri koncernantojn – transitivan aganton, agoricevanton kaj aldoniton. Ekz. ,

e-kik "x₂-o x₃-on per x₅-o batas" (p. 142)

derivita de

kik "x₂-o x₃-on batas.

Povas okazi, ke aldona prefikso kaj iga sufikso intermetas netransitivan radikon. Ekz. ,

e-sik-te "x₄-o x₁-on per x₅-o plenigas" (p. 20)

derivita de

sik "x₁-o pleniĝas".

Ĉi tiu deriva verbo postulas iganton (x₄), netransitivan aganton (x₁) kaj aldoniton (x₅), kaj montras netransitivan agon.

¶ 5. Enhavado – enhavata (interna) koncernanto

¶ 5-1. Estas inter malsimplaj verboj tiuj, kiuj enhavas koncernanton en si. Ekzemple, en la formo

sajo-sak "al x₂-o mankas kaĉo" (p. 48)
"x₂-o ne havas eĉ kaĉon kaj estas malsata"

troviĝas la transitiva radiko

sak "al x₂-o x₃-o mankas",

al kiu algluiĝas la substantivo sajo "kaĉo" kiel enhavata (interna) agoricivanto. Pro tio tiu ĉi kunmetita verbo postulas, simile al netransitiva simpla verbo, nur unu koncernanton ekster si; tiu estas tamen transitiva aganto.

¶ 5-2. Resendaj prefiksoj funkcias kiel internal koncernantoj. En la aina lingvo estas kvar specoj da resendaj prefiksoj, kiuj havas certan kaj propran funkcion.

si- "si": si-kiru "x₂-o sin turnas" (p. 78)

derivita de

kiru "x₂-o x₃-on turnas".

jaj- "si": jaj-otuŝasi "x₂-o fieras pri si" (p. 94)

derivita de

otuŭasi "x₂-o x₃-on laŭdas".

(Pri la sama traduka vorto por si- kaj jaj- vidu ¶ 5-4.)

he- "sia kapo": he-puni "x₂-o levas sian kapon" (p.120)

derivita de

puni "x₂-o x₃-on levas".

ho- "sia postaĵo": ho-puni⁴⁾ "x₂-o levas sian postaĵon"
= "x₂-o starigias"


u- "inter si": u-tasa⁵⁾ "x₂-oj kruciĝas inter si"

derivita de

tasa "x₂-o kun x₃-on kruciĝas".

La resenda prefikso estas tio, kio mem fariĝas interna koncernanto kaj samtempe montras akompanan koncernanton eksteran (= ne enhavatan). En ĉiuj ĉi supraj ekzemploj la resendaj prefiksoj algluiĝas kiel agoricevanto montrante transitivan aganton resende. La gramatika vorto "resendo" aŭ "refleksivo" signifas ordinaro tiun aferon, ke, se esprimi laŭ mia dirmaniero, sama ulo aŭ aĵo fariĝas samtempe du diferencaj koncernantoj de sama ago. En la aina lingvo koncernantoj, inter kiuj oni trovas resendan rilaton, ne necesas esti tute same. Ankaŭ tut-kontraŭ-parto rilato (he-, ho-) kaj reciprokeco (u-) estas rigardataj kiel havi resendecon. Ĉi subaj figuroj klarigas la resendajn prefiksojn de la aina lingvo. La ovformaj rondoj montras koncernanton, kaj la kurboj kun sago montras agon. La figuro de u- eksplikas, kial oni rigardas reciprokecon kiel havi resendecon: unu koncernanto agas kontraŭ la alia, kaj samtempe ricevas la saman agon de tiu. La rezulto identiĝas kun la okazo, ke li agas kontraŭ si mem, kiel la intermita kurbo aludas.

Figuro. Resendaj prefiksoj de la aina lingvo



¶ 5-3. Aliaj ol la resendaj prefiksoj ekzistas kvar verbaj prefiksoj (ĉi-, i-, e-, kaj o-), kiuj ludas internan koncernantan rolon, tamen havas nenian resendan funkcion. El ili e- kaj o- (kvankam la sonformoj estas samaj kun tiuj de la aldona e- kaj o-, la funkcioj estas tute malsamaj) estos traktataj en la sekva kaj fina sekcio, kaj ĉi- en la finaj du sekcioj. i- estas uzata jene.

i-ruska "x₂-o koleras" (p. 48)

kaj

i-rara "x₂-o faras malbonon petolante" (p. 72)

derivitaj de

ruska "x₂-o kontraŭ x₃-o koleras"

kaj

rara "x₂-o al x₃-o faras malbonon petolante".

Ni vidas, ke la prefikso i- okupas la lokon de agoricevanto; pro tio x₃ de ruska kaj rara malaperas en i-ruska kaj i-rara. La deriva verbo tamen neniel ŝajnas enhavi konkretan koncernanton. Same kun la poste dirota prefikso ĉi-, la prefikso i- ne montras akompanan koncernanton resende, nek signifas ion ajn difinan, nur ŝtopas vakan seĝon rezervitan por iu koncernanto (ĉefe por agoricevanto). Kontraŭe, jenaj verboj,

i-ku "x₂-o trinkas" = "x₂-o faras trinkadon"⁶⁾

kaj

i-ri "x₂-o senhaŭtigas" = "x₂-o faras senhaŭtigadon"
(p. 100)

derivitaj de

ku "x₂-o x₃-on trinkas"

kaj

ri "x₂-o x₃-on senhaŭtigas",

estas uzataj ordinare por esprimi, ke "x₂-o trinkas alkoholaĵon" kaj "x₂-o senhaŭtigas beston". Sekve oni povas ĉiokaze prezenti al si konkretajn montratojn de la prefikso, t. e. i- de i-ku montras "alkoholaĵon", kaj i- de i-ri montras "beston". Tamen, se oni donus ĉi tiel iun montran funkcion al la prefikso, oni prefere supozu, ke ĝi montras "nedifinaĵon", kaj konsideru, ke ties nedifineco iufoje povas esti limigita kaj difinita kiel konveni al la kunteksto, precipe al la senco de la radiko, al kiu la prefikso algluiĝas.

¶ 5-4. Verba radiko bezonas igan sufikson ordinare por enhavi aganton (pri la escepto vidu ¶ 6). Ekz.,

u-kira-re "x₄-oj ĉiuj forkuras" (p. 80).

La fina ero -re estas unu formo de iga sufikso. La reciproka u- do povis algluiĝi estante aganto de la netransitiva ago kira "x₁-o forkuras", kaj la tuto de la verbo postulas iganton ekstere, kiel "x₄-oj forkurigas unu la alian".

La verbo ĉi sekvanta enhavas transitivan aganton.

osor-us-i "x₄-o sur x₃-on sidiĝas" (p. 120).

La algluiĝo de la iga sufikso -i al la transitiva radiko us "x₂-o al x₃-o algluiĝas" ebligas interniĝon de la substantivo osor "sidvangoj" kiel aganto. Sekve ĉi tiu

kunmetado konstruas tiel kompleksan sencon, ke "x₄-o igas siajn sidvangojn algluiĝi al x₃-o". Ni rimarkas, ke la enhavata substantivo osor funkcias resende simile al la resenda prefikso ho- aŭ he-.

Nun la leganto rememoru la jam prezentitajn resendajn prefiksojn, inter kiuj troviĝis du formoj, si- kaj jaj-, al kiuj mi donis la saman tradukan vorton "si" laŭ la kutimo de la aina gramatiko (§ 5-2). Kvankam iliaj funkcioj devas esti iel malsame, ĉar la sonformoj estas malsame, ankoraŭ ne estas inter la gramatikistoj konvinka klarigo pri la diferenco⁷⁾. La leganto ja ne povas fari distingon en la ekzemploj prezentitaj antaŭe (§ 5-2). Tamen la propreco de ĉiu el ambaŭ prefiksoj malkovriĝas iom en la okazo, ke resenda prefikso kaj iga sufikso intermetas transitivan radikon.

si-kasuj-re "x₄-o igas x₂-on helpi lin (=x₄)" (p. 26)

derivita de

kasuj "x₂-o x₃-on helpas".

La prefikso si- okupas la lokon de agoricevanto (x₃) montrante iganton (x₄) resende. Nome, si- = x₃ = x₄. En la verbo

jaj-kor-e "x₄-o igas sin havi x₃-on"
= "x₄-o x₃-on havas" (p. 14)

derivita de

kor "x₂-o x₃-on havas",

tio, kio estas montrata resende de jaj-, estas, same kun si-, la iganto, tamen jaj- mem, malsame ol si-, okupas la lokon de transitiva aganto. Nome, jaj- = x₂ = x₄. Ni rimarkas, ke la deriva verbo jaj-kor-e havas la saman konstruon kun la ĵus prezentita osor-us-i "x₄-o igas siajn sidvangojn algluiĝi al x₃-o", kiun ni povas reprezenti jene.

(transitiva aganto) + (transitiva radiko) + (iga sufikso)
osor ; jaj- us ; kor -i ; -e

Dume, la konstruo de si-kasuj-re estas

(agoricevanto) + (transitiva radiko) + (iga sufikso).

si- kasuj -re

Nun ni trovis, ke la du prefiksoj estas disdonitaj al la apartaj konstruoj.

La esprimo jaj-kor-e ŝajnas esti trolonga ĉirkaŭfrazado. Se estus iu diferenco ol nura trolongeco inter kor kaj jaj-kor-e, se diri ĝenerale, inter simpla verbo konsistanta el sola transitiva radiko kaj deriva verbo konsistanta el transitiva radiko intermetita de jaj- kaj iga sufikso, oni ankoraŭ ne povas klarigi tiun.

¶ 5-5. Por la interniĝo de aldonito troviĝas jena ekzemplo.

soj-o-terke "x₁-o saltas al ekstero de domo"
="x₁-o elsaltas el domo" (p. 72)

farita el la netransitiva radiko

terke "x₁-o saltas",

kiu prenas la aldonan prefikson o-, kaj enhavas substantivan soj "ekstero de domo" kiel aldoniton.

La interniĝon de iganto mi traktos en la finaj du ĉapitroj.

¶ 6. Diversaj koncernantoj (3) – posedanto

Oni ne povas kompreni la funkcion de jena kunmetita verbo per iu ajn supre prezentita koncernanto.

keŭtum-ŭen-te "x₄-o x₆-on malagrabiligas" (p. 122)

farita el

ŭen "x₁-o estas malbona".

La netransitiva radiko ŭen prenas la igan sufikson -te kaj enhavas substantivan keŭtum

“animo” kiel netransitivan aganton. Sekve ŝajnas, ke ĉi tiu verbo postulas ekster si solan iganton. Verdire, ĝi postulas tamen alian koncernanton krome, kiu respondas al posedanto de la animo. La origina senco de la kunmetita verbo estas “ x_4 -o malbonigas la animon de x_6 -o”. Ni nomu ĉi tiu novan koncernanton, x_6 , posedanto. La leganto rimarku, ke la enhavata substantivo keŭtum neniel havas tian resendan funkcion, kian osor “sidvangoj” de osor-us-i “ x_4 -o al x_3 -o algluas siajn sidvangojn” (§ 5-4) havas. La keŭtum enkondukas novan koncernanton, dum la osor montras akompanan koncernanton resende. La posedant-kontraŭ-posedata, alidire, tut-kontraŭ-parta rilato estas esprimata per du apartaj rimedoj: oni utiligas posedan rilaton en la antaŭa okazo, kaj resendan rilaton en la lasta okazo.

Estas prefiksoj, kiuj postulas posedanton pozitive.

Ekz. ,

o-tuj “la vosto de x_6 -o tranĉiĝas”
= “ x_6 -o havas tranĉitan voston” (p. 24)

derivita de

tuj “ x_1 -o tranĉiĝas”.

Se ni komparas ĉi tiun kun la antaŭe prezentita aldona o-rep “ x_1 -o frapante x_5 -on taktas” aŭ o-terke “ x_1 -o x_5 -on surpaŝas (§ 4), ni komprenos la proprajn karakterojn de ambaŭ samsonaj prefiksoj. o- de o-rep kaj o-terke nur enkondukas aldoniton kiel novan koncernanton, dum o- de o-tuj, kiu signifas “la vosto de x_6 -o”, ne nur postulas novan koncernanton, posedanton, sed ankaŭ mem funkcias kiel netransitiva aganto substitute al x_1 . Ni nomu ĉi tiun prefikson poseda prefikso. Ĉi sekva o- ludas agoricevantan rolon.

o-saŭsaŭa “ x_2 -o la radikon de x_6 -o skuas multfoje” (p. 134)

derivita el

saŭsaŭa “ x_2 -o x_3 -on skuas multfoje”
(ripeta formo de saŭa “ x_2 -o x_3 -on skuas”).

Ĉi tiu deriva verbo troviĝas en la frazo esprimanta, ke la heroo Pon Okikirmuj (x_2) skuas la malpuran palison (x_6) por eltiri ĝin el riverkuŝejo.

La poseda prefikso o-, kiun mi provizore transigis al "la bosto de x_6 -o" aŭ "la radiko de x_6 -o", kaj povas aliel en aliaj okazoj, signifas unuvorte "la fino de x_6 -o (=iu longaĵo)". Same, la resenda prefikso ho- (§ 5-1), kiun mi prezentis kiel "sia postaĵo" provizore, povas esti transigita al "sia fino" pli ĝenerale (vidu krome la paragrafon duan de la lasta en § 8). Oni preskaŭ ne bezonas diri, ke la du prefiksoj funkcias tute malsame malgraŭ tio, ke ili montras la saman tut-kontraŭ-partan rilaton. ho- de ho-puni "x₂-o levas sian postaĵon" estas almetita nur kiel agoricevanto, dum o- de o-saŭsaŭa ne nur okupas la lokon por agoricevanto, sed ankaŭ enkondukas posedanton kiel novan koncernanton.

Krom o- unu alia prefikso ekzistas, kiu postulas posedanton. e- "la kapo de x_6 -o" estas tio. Kvankam poseda e- estas samsona kun aldona e-, kaj similas resendan he- "sia kapo" paralele kun la sencsimileco inter o-, kaj ho-, tamen ni ne konfuzos ilin. Ekz.,

e-us "la kapo de x_6 -o al x_3 -o algluiĝas
= "x₆-o al x_3 -o algluas sian kapon" (p. 70)

derivita de

us "x₂-o al x_3 -o algluiĝas"

Ĉi tiu deriva verbo montras en la originala teksto la movon fari fajron ŝovante la kapon sub kuirpoton pendantan super fajrejo, kaj postulas posedanton (x_6) de "la kapo" kaj agoricevanton (x_3 = "subo de - spaco sub - kuirpoto"). En la originala teksto ĉi tiu verbo estas ripetita kiel euseus kaj esprimas vive la movon blovi braĝon proksimigante la vizaĝon al ĝi multfoje.⁸⁾

¶ 7. Vola kaj senvola ago

El ĉiuj verbaj prefiksoj, kiuj rilatas koncernanton, nur unu restas ne pridirita.

ĉi-(as-)tustek-ka (p. 66)
"x₁-o (haltinte) eksilentas" (surpriziĝante pro io).

Ĉi tiu verbo entenas du verbajn radikojn – as “ x_1 -o haltas” kaj tustek “ x_1 -o eksilentas”. Ni povas rigardi la antaŭan kiel adverban eron modifantan la lastan. Ni do metu ĝin inter krampojn kaj ne tusu ĉi tie (en la sekvantaj ekzemploj ni traktos same). La kerno de la verbo estas

tustek “ x_1 -o eksilentas”,

kiu prenas la igan sufikson -ka.

tustek-ka “ x_4 -o x_1 -on silentigas”,

kaj akceptas plu la prefikson ĉi-,

ĉi-(-) tustek-ka “ x_1 -o eksilentas”.

Estas alia, sed simila dirmaniero, per kiu oni montras la saman movon de surprizito.

ĉi-(as-) rupus-ka “ x_1 -o (haltinte) frostiĝas”⁹⁾

derivita de

rupus “ x_1 -o frostiĝas”.

Ni vidas, ke la verba funkcio disvolviĝas laŭ la derivado kaj fine rondiras al la devena funkcio, nome, la ekstera koncernanto de la fina formo de la derivado estas, same kun tiu de la devena formo tustek aŭ rupus, netransitiva aganto (x_1). Sekve la interna koncernanto ne povas esti alia ol iganto. La prefikso ĉi- ŝtopas do la seĝon por iganto (x_4). Ni povas prezenti, se diri tiel, “la ostaron de sencó” de la verboj kiel jene.

“ĉi-o igas x_1 -on eksilenti (frostiĝi)”.

Same kun la nedifina prefikso i- (§ 5-3), la prefikso ĉi- montras “nedifinaĵon”. Oni ne povas doni difinitan montritaĵon al ĉi tiuj prefiksoj. Por ke la leganto konvinkiĝu, mi tamen subproponas, ke ĝi montras “la naturan forton”.

Jen la ekzemplaĵo, kiu havas la saman konstruon kun la supraj.

ĉi-(oar-)kaj-e "x₁-o (tute) rompiĝas" (p. 56)

Ĉi tiu verbo, kiun oni trovas en la frazo, ke remilo (x₁) tute rompiĝas (ĉioarkaje) dum severa remado, deriviĝas de

kaj "x₁-o rompiĝas",

kiu prenas la igan sufikson -e,

kaj-e "x₄-o igas x₁-on rompiĝi"
= "x₄-o x₁-on rompas",

kaj akceptas la prefikson ĉi-.

ĉi-(-)kaj-e "ĉi-o x₁-on rompas"
= "x₁-o rompiĝas".

Ni vidas ankaŭ ĉi tie rondiran disvolviĝon de verba funkcio aŭ la derivado. Tamen tiu derivado estas nek superfluaĵo, nek trolonga frazado nura. La konstruo

ĉi- + (netransitiva radiko) + (iga sufikso)

metas certan nuancon en la radikan sencon.

En la verbo ĉi-(as-)tustek-ka la konstruo aldohas la sencon, ke la aganto faras la radikan agon sen volo.

Pri la verbo ĉi-(oar-)kaj-e ni komprenas ĝuste male. Se aganto estas tio, kio ne povas havi volon kiel remilo, la konstruo aldonas la sencon, ke la aganto agas kvazaŭ volhavanto. Kiel la saman ekzemplon oni trovas jenan verbon.

ĉi-rikin-ka¹⁰⁾

derivita de

rikin "x₁-o leviĝas".

Ĉi tiu verbo esprimas, ke trezoroj (x_1) estas amasigitaj kaj metitaj unu sur alian alten, kvazaŭ ili estus leviĝiantaj (rikin) per si malgraŭ ke ili ne estas vivantoj.

Nun ni ne nur akiris ĉiujn bezonaĵojn por kompreni la konstruon kaj la senco de la verbo ĉi-o-us-i, sed ankaŭ lernis la plej gravajn punktojn pri la verba derivado de la aina lingvo.

¶ 8. La molekula konstruo de ĉi-o-us-i

Inter la ainaj verboj kvankam troviĝas tiuj, kiuj havas komplikitan konstruon, ili estas faritaj tamen tiel regule, kiel ilian ostaron de senco – mi nomis ĝin iam en ĉi tiu traktaĵo ankaŭ “origina senco” – oni povas kompreni facile kaj senkonfuzo, se oni ĝuste disigas la formon en erojn, kaj rekonas ĉiujn membrojn de koncernanto internajn aŭ eksterajn. Ni vidis, ke ĉiu derivado kaj kunmetado neniam influas funkcion de radiko, nur enkondukas novan koncernanton aŭ ŝtopas seĝon por koncernanto; nek ŝanĝas radikan senco, nur aldonas ian senco al ĝi.

Nun mi pridiru la komence prezentitan ĉi-o-us-i, kvankam la plua klarigo jam povas esti apenaŭ bezona. Rememoru la aferon montratan de la frazo, en kiu troviĝas ĉi tiu verbo: “La paliso atingas (ĉiousi) la transon de la ses inferoj” (¶ 1). Ni reprezentu la aferon, por ke la ostaro de senco klariĝu.

ĉi-	-i	o-
“la natura forto”	igas	la finon de
(iganto)		(transitiva aganto)
us		
la paliso	algluiĝi al	la transo de la ses infero.
(posedanto)	(transitiva ago)	(agoricevanto)

El la kvar koncernantoj la iganto (ĉi-) kaj la transitiva aganto (o-) estas enhavataj en la verbo; ceteraj estas eksteraj koncernantoj. Oni erarkomprenus la frazon, se oni intermiksus posedan o- kaj aldonan o-: Se reprezentu la derivadon laŭvice,

us “ x_2 -o al x_3 -o algluiĝas”

o-us “la fino de x_6 -o al x_3 -o algluiĝas”

(Komparu kun e-us en ¶ 6.)

o-us-i x₄-o igas la finon de x₆-o al x₃-o algluiĝi”

ĉi-o-us-i “ĉi-o igas la finon de x₆-o al x₃-o algluiĝi”
= “la fino de x₆-o al x₃-o algluigas”
= “x₆-o(=longaĵo) x₃-on atingas”.

La verbo ĉi-o-us-i postulas posedanton (x₆) kaj agoricevanton (x₃) same kun la pli simpla formo o-us. Tamen ni scias, ke la derivado ne estas vana. Rezulte de la derivado, la nova senco estas aldonita, ke la ago estas farata de pseŭdo-volvanto, nome, kvankam la paliso ne estas vivanto kaj havas nenian volon nature, ĝia fino etendiĝas kaj algluiĝas al la transo de la ses inferoj, kvazaŭ ĝi volus agi tiel.

Ekzistas ankaŭ jena verbo, kiu staras en la para rilato al ĉi-o-us-i.

ĉi-e-us-i “ĉi-o igas la kapon de x₆-o al x₃-o algluiĝi”
= “la kapo de x₆-o al x₃-o algluigas”
= “x₆-o(=longaĵo) x₃-on atingas”¹¹⁾

(Komparu kun e-us en ¶ 6.)

En ainaj rakontversaĵoj aperas grandega monstrobirdo, kies flugiloj estas tre vastaj. Unu (x₆) el ill etendiĝas kaj atingas (ĉieusi) “la laste supran ekstremon de la mondo” (si-mosir-pa, x₃), la alia (x₆) atingas (ĉieusi) “la laste malsupran ekstremon de la mondo” (si-mosir-kes, x₃).

Rilate al ĉiokaza prefero de e- ol o-, kaj ĉi tie trovitaj duonmemstaraj substantivaj vortetoj -pa “la supra ekstremo” kaj kes “la malsupra ekstremo”, kiuj konsistigas kun e- kaj o-, kaj he- kaj ho- trion da paroj montrantaj la saman supr-kontraŭ-malsupran rilaton (la tradukaj vortoj “kapo” kaj “fino” prezentitaj antaŭe por e- kaj o-, kaj he- kaj ho- (¶ 6) estis nur provizoraj) – ni rimarkas, ke Ainoj distingas du specojn da ekstremoj. En la lingvo ne ekzistas tia abstrakta esprimo, kia respondas al nia “ekstremo”, nur ekzistas tiel distingitaj esprimoj kiel “supra ekstremo” kontraŭ “malsupra ekstremo”. Supozeble, estas decidite laŭ iu principo, kiu el du ekstremoj de longaĵo estas “supra” (e-/he-/pa) aŭ “malsupra” (o-/ho-/kes). Ainoj distingas do du manierojn en etendiĝo kaj atingado de longaĵo.

Nun ni finu nian etan ekskurson pri la verba derivado de la aina lingvo. La leganto

ekkonas, ke tio, kio respondas ĉi tiom konsiderinde komplikan aferon, estas montrata de la radiko "ating-" en nia lingvo, se diri tiel, "unuvorte", dum en la aina lingvo oni esprimas la preskaŭ saman aferon per atomaj eroj kunligitaj en mirinde preciza molekula konstruo kiel ĉi-e-us-i aŭ ĉi-o-us-i.

NOTO

La originala teksto estas "『ウエネウサラ』 創刊号(1987) :37-63".

Respondeculo pri ĉi tiuj paĝoj: JOKOJAMA Hirojuki- Hokkajda Esperanto-Ligo

1) Ĉi tiu traktaĵo estas verkita originale per la japana lingvo sub la titolo "Ainu-go wa Donna Gengo ka - Hitocu no Hasee-doosi o Megutte" (kia estas la aina lingvo? - pri iu deriva verbo) kiel kontribuaĵo al la monata revuo Gengo (lingvo) Vol.14, N-ro 2, Taisyukan Syoten, Tokio, 1985. La nuna esperanta verko estas tamen ne nur ĝia traduko. Ĉi verkinto reskribis la antaŭan enhavon pliklarigante multajn esprimojn, aldonante kelkajn ekzemplaĵojn, uzante signojn (x_1, x_2, \dots, x_6) por montri semantikajn kazojn, kaj alskribante kelkajn vortojn al du vickemojn, kiuj preskaŭ ne estas tuŝitaj en la antaŭaĵo - li proponis nove, ke la aina lingvo havas du rimedojn, per kiuj oni montras tut-kontraŭ- partan rilaton (§ 6), kaj li eksplikis la ideon de "du ekstremoj de longaĵo" (§ 8).

2) CIRI Yukie (ĉiri jukie), Ainu Sinyoo-syuu (ainaj kantoj de dioj), dulingva (aina kaj japana), 1923, el kiu ĉi verkinto akiris ĉefan materialon por la studo. Por montri la fontojn de la ekzemplaĵoj li prezentis paĝojn de la eldono de Iwanami Bunko (poŝformata serio de Iwanami), Iwanami Syoten. Tokio, 1978.

Okaze de citi la ainajn vortojn ĉi verkinto ŝanĝis kelkajn originalajn skribformojn. La konsonantojn, kiuj estas prezentitaj per ch- kaj -sh en la originalo, li anstataŭis per c-, kaj -s; la duonvokalojn prezentitajn per w- kaj -u, kaj y- kaj -i li anstataŭis per u kaj i. Ĉi tiu transigo estas esperantostila parte, tamen respondas ĝuste al la nuna transskribmaniero de la ainaj sonoj, kiu konvenas plej bone al la sonsistemo de la aina lingvo.

3) Ainaj Kantoj de Dioj estas esperantigita el la originala japana teksto fare de Hokkajda Esperanto-Ligo sub la titolo Ainaj Jukaroj (Sapporo, Japanio, 1978). La verso respondanta al la ekzempla frazo troviĝas sur p. 75 de la eldono: "atingas ĝi la fundon sesinferan".

4) ho-puni estas singulara formo. En Ainaj Kantoj de Dioj oni trovas nur la pluralan formon ho-punpa.

5) En Ainaj Kantoj de Dioj oni trovas nur la ripetan formon de utasa, utasatasa.

6) En Ainaj Kantoj de Dioj ĉi tiu verbo estas uzata substantive ĉiam en la senco de "trinkado de alkoholaĵo". Ĝeneraldire ainaj verboj, kiuj postulas unu koncernanton solan, povas funkcii ĉi tiel substantive. Vidu KIRIKAE Hideo, "Ainu-go no Meesi-ku no Koozoo to Goosee-meesi" (la konstruoj de substantivaj vortgrupoj kaj la kunmetitaj substantivoj de la aina lingvo). Gengo Kenkyuu (revuo de lingvistika societo de Japanio), N-ro 86, Tokio, 1984, pp.105-121

7) KINDAICI Kyoosuke, "Ainu Yuukara Gohoo Tekiyoo" (gramatika skizo de la lingvo de ainaj epopeoj), Ainu Zyoziŝi Yuukara no Kenkyuu (studo de yuukara, ainaj epopeoj), Vol.2, Tooyoo Bunko, Tokio, 1931, ¶ ¶ 209-215, pp.149-153

8) Trovis la funkciajn diferencojn inter he- kaj e-, kaj ho- kaj o- Profesorino TAMURA Suzuko. Tamen ŝi traktis la diferencojn aliel ol mi. Vidu TAMURA Suzuko, "Ainu-go Saru Hoogen no Goosee-doosi no Koozoo" (la konstruoj de kunmetitaj verboj de Saru-a dialekto de la aina lingvo), Azia Ahurika Bunpoo Kenkyuu (azia kaj afrika lingvistiko) N-ro 2, Azia Ahurika Gengo Bunka Kenkyuu-zyo, Tookyoo Gaikoku-go Daigaku (instituto por la studo de lingvoj kaj kulturoj de Azio kaj Afriko, Tokio-universitato de fremdaj lingvoj), Tokio, 1973, pp.73-94.

9) KUBODERA Iuhiko, Ainu Zyoziŝi, Sinyoo Seeden no Kenkyuu (la studo de kantoj de dioj kaj sanktaj tradicioj, la ainaj rakontversajtoj), Iwanami Syoten, Tokio, 1977, Seeden (sankta tradicio) 15, Gyuukai (noto kaj interpreto) 92, p.740.

10) KINDAICI Kyoosuke, "Kutune Shirka" (epopeo), s1., p.240.

11) CIRI Yukie Nooto (manskribaĵo de CIRI Yukie), Hokkaidoo Kyooiku I' inkai (eduka komitato de Hokkaidoo), Sapporo, 1986, p.148.